
# LUPIDOJ LERNAS - infanpoemo

Sub la fago, en arbaro
vivis iam lupa paro
kaj lupidoj grizafelaj,
pintorelaj, pintmuzelaj.
La gepatroj iris ĉasi,
idojn devis do forlasi
kaj avertis malspertulojn:
"ne timegu etajn kulojn,
tamen timu la abelojn!
Gardu, ŝirmu la muzelojn,
ĉar abeloj forte pikas!
La lekado ne efikas
kaj muzelo ŝvelas, ŝvelas,
tre doloras kaj malbelas.

Tre danĝeras ank' vipuro,
eĉ pli multe! Ĝia spuro
evitendas! Ne scivolu,
en kavaĵo sidi volu,
kiam la gepatroj ĉasas,
tien - reen ĉase pasas.
Morgaŭ estos leciono
pri la tuta regiono:

kiel hejmen trovi vojon,
kiel serĉi puran rojon,
kiel mordi tedajn pulojn,
kaj nun dormu jam etuloj!"



La poemo aperis en Fabela Mondo, Volumo 1.
Ni publikigas ĝin kun la permeso de Esperantina Mirska, filino de la aŭtorino